4-a Jaro. N-o 187 APERAS S.A.T. SEMAJNE 3. Majo 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

## La kreskado de la laborista movado en Japanio

Per siaj lastaj elektoj Japanio unuafoje efektivigis la ĝeneralan voĉdonadon, almenaŭ por la viroj. Kio speciale karakterizas tiun ĉi baloton, estas la fakto, ke la laboristaj partioj havas kelkajn elektitojn. Kaj, kvazaŭ hazarde, la sekvantan tagon post tiu ĉi opiniesprimo la registaro de l' barono Tanaka malkovris revolucian komploton kaj malliberigis preskaŭ 500 ekstreme-maldekstrajn aktivulojn. Azio pli kaj pli similas al Eŭropo.

Nur malrapide alvenas sciigoj Eŭropon pri tiuj abomenaj agoj, ĉar la japana cenzuro malpermesis ĉiun komunikon pri la afero kaj nur lasttempe nuligis tiun malpermeson. Tiuj novaj kontraŭlaboristaj persekutoj klare celas savi la grandajn posedulojn, kiuj formas la kernon de l' registara partio, kontraŭ la danĝero, kiu ilin minacas flanke de la kamparana movado. Unuiĝon inter industrilaboristoj kaj kamparanoj oni nepre celas malhelpi.

Japanio renoviĝas ankoraŭfoje. Estas lando, kies evoluoj estas rapidaj kaj kie la ideoj vojiras kun forto, eĉ kiam troviĝas ministroj por ilin kontraŭbatali. Oni multe parolis pri la facileco de l' adaptiĝo kaj asimiliĝo de l' japanoj. Ĉiuj niaj tezoj, niaj doktrinoj estas diskutataj ĉe ili kun tia entuziasmo, kian ni ne plu konas. Tiu ĉi maljuna popolo restas eterne juna, kaj povus esti, ke ĝi rezervas al ni multe da surprizoj.

Neniu forgesis la revolucion de l' jaro 1868. Ĝi distingiĝis per la renverso de l' feŭda reĝimo; sed ankaŭ per la anstataŭigo de l' imperia absolutismo per la oficiala regado de l' palacestroj. Plej grave estis, ke Japanio, ĝis tiam limigita en si mem, larĝe kontaktiĝis kun la Okcidento kaj kun Ameriko. Rezultis por ĝi alfluego de novaj ideoj. Samtempe ĝi ĵetiĝis sur la industriismon, kreis fabrikojn kaj partoprenis la internacian komercon.

En jaro 1889 estis proklamata la konstitucio. Fakte ĝi nur estis trompaĵo. La oficiale ekstermita feŭdeco estis sin transvivinta. La malnovaj klanoj simple transformiĝante alprenis politikajn etiketojn. La grandaj familioj regis la Ĉambrojn, kie ili enoficigis siajn kreitulojn, kaj ĉiu ministerio devis tiaforme kunmetiĝi, ke ĉiu klano ricevis siajn garantiojn. La tiama politika Japanio havis multajn parencecojn kun la Anglio de l' 18-a jarcento.

Transirante al ĝenerala voĉdonado, ĝi trapasis la saman evoluon kiel Britio. Oni ĉeestis serion da luktoj inter malnovaj klanoj, kiuj interdisputis pro la potenco. Iuj inter ili restis pure aristokrataj; aliaj emis sin apogi sur la amasoj. Tiel oni paŝis en tiu ĉi jaro de 2½ milionoj al 12 milionoj de elektantoj.

La industrio pli kaj pli disvolviĝis, sampaŝe la laborista movado, kiu protestis kontraŭ la kondiĉoj de l' Laboristaro. Oni provis pacigi ilin, donante al ili — kiel en Francio en jaro 1848 — la voĉdonrajton.

Sed tio nur estis etapo. Ekaperas nova Japanio, kie la revolucia propagando disvastiĝas kiel aliloke, kaj kiu havas socialistan kaj komunistan partiojn. La lando de l' "samurais" kaj de l' "hara-kiri" familiariĝis kun la doktrino de Marks, kun la teorio de l' klasbatalo kaj de l' proletara diktaturo.

Milionoj da kamparanoj estas elradikigitaj, kaptitaj de la fabrikoj, fariĝis industriaj dungitoj. Ili spertis, kiel la ĉiniaj kulioj, kiel la hindoj, kaj pli ankoraŭ ol la eŭropanoj, la longajn labortagojn kaj la malaltajn salajrojn. Kiam oni esploras, kiom da centimoj akiris iam ŝpinisto aŭ teksisto en Kobe aŭ Osaka por 16 horoj da laboro, oni estas surprizita, ke tiu ĉi reĝimo povis sin teni tiel longe. Japanio estis vera laborista infero, kaj se la kondiĉoj de tiuj proletoj iomete pliboniĝis, ili ŝuldas tion nur al siaj propraj penadoj.

La unuaj sindikatoj stariĝis post la jaro 1880: tiu de l' presistoj en j. 1884, de l' metalistoj 1889; tiam kreiĝis en j. 1897 Amika Societo de l' Laboristoj laŭ la modelo de l' usonaj Tredjunioj. Tiam malfermiĝas la periodo de la grandaj strikoj; tiutempe ankaŭ etendiĝas la socialistaj ideoj. En j. 1901 la malgranda laborista partio, naskiĝinta en Nagasaki fine de l' 19-a jarcento, aliĝas al la Internacio, kaj oni memoras la emocian scenon dum la Amsterdama kongreso en j. 1904, kiam la rusa delegito Plekanof kaj la japana delegito Sen Katajama ĉirkaŭprenis sin sur la tribuno, dum la kanonoj tondris en ekstrema oriento.

La socialismo fariĝas minaca, kaj la registaro persekutas. En j. 1910 estas proceso kontraŭ Kotoku kaj kunuloj. — La mondmilito havis la samajn efikojn kiel aliloke: mizeriĝo de la loĝantaro, skandaloj de novriĉuloj, nova kaj pli aktiva disvastiĝo de l' socialistaj ideoj.

Marks estas sur la tagordo de ĉiuj universitataj kluboj. En j. 1921 la Amika Societo transformiĝas en Ligon de sindikatoj, kiu nombras preskaŭ 230 000 membrojn.

Vane la regpotenco furiozas kun pli granda perforto kaj rifuzas leĝigi la statuton de l' sindikatoj. Vane ĝi proklamas esceptajn leĝojn, kiel en jaro 1925[1]). Ĝi ne sukcesas haltigi la movadon, kiu fortiĝas samgrade kiel la kapitalismo mem.

Jen la nova Japanio. Kaj kiam ĉiuj landoj de l' ekstrema oriento hodiaŭ fermentas sub la multoblaj influoj, la grandegaj homamasoj moviĝantaj en la japania insularo evoluas kun kapturniga rapideco.

Eŭropano.

# LA HODIAŬA USONO

(Vidi la antaŭan n-on)

II

Se la morala atmosfero de l' usona socio tiom diferencas de tiu de Eŭropo, rilate al la industrio transoceana kaj eŭropa du mondoj esence malsimilaj malkovriĝas al niaj okuloj.

La rasa diferenco retrovas sin en ekonomia kampo. Ekzistas inter la origina elemento kaj la nove-venintoj neasimileblaj vera hierarkio de sociaj funkcioj. La nedezirataj de mediteranea kaj orientana origino ĝenerale estas malriĉuloj pelitaj de la mizero kaj de "pogromoj", pretaj akcepti ĉiun ajn okupon, la plej penigan kiel la plej naŭzan. El iliaj vicoj fakte rekrutiĝas la plimulto el nekvalifikitaj laboristoj kaj grandindustriaj manlaboristoj: malklera kaj kompatinda amaso, kiu vivas malestimata de veraj amerikanoj.

Ĉi lastaj, vera aristokrataro laŭ deveno kaj funkcioj, liveras al la socio siajn neanstataŭeblajn kadrojn kaj al la ekonomia organizo solidan fundamenton. La industria stabo estas do en iliaj manoj, kaj ili ankaŭ havas la plimulton en kelkaj metioj (ekz. mekanikistoj, elektristoj) kiuj postulas certajn teknikajn konojn.

Al amerikanoj do, direktanta rolo; al la amaso de nove-venintoj la malsuperaj bezonoj, kiuj postulas la muskolan forton kaj la korpan laciĝon. Se oni volas trovi kelkparte analogajn laborkondiĉojn, oni ne devas pensi pri Eŭropo, sed pri iuj koloniaj socioj. Tie troviĝas malplimulto, la blanka aristokrataro, kiu prenas sur sin la gvidon de l' laboro, kaj la amaso da indiĝenoj, kiu plenumas ĝin. Anstataŭu tie la blankulon per la amerikano kaj la indiĝenon per la nedezirato, kaj vi havos ion similan al la laborkondiĉoj en nuntempa Usono.

Sed ni ne daŭrigu pluen la komparon. La amerikana aristokrataro ne estas kasto. Proporcie kun la amerikaniĝado de la malsupera amaso, kiu samtempe ŝanĝas bezonojn, tendencojn kaj okupojn, kies vivnivelo leviĝas, ĝi eniriĝas tien siajn plej bonajn elementojn — laŭ rigore amerikana vidpunkto — tieldire la plej asimiliĝintajn.

Ĉiuokaze, oni tuj vidas, kiu kategorio de manlaboristoj maloftiĝis pro la haltigo de l' slavo-latina enmigrado. Sed oni eble ne sufiĉe imagas, ke tiu ĉi memvola limigo de l' nombro da disponeblaj brakoj havis ĉefan konsekvencon: la altiĝon de l' salajroj. Kaj ĝi ricevos tutan sian signifon, se oni pripensas, ke depost 1921 ĝia kurbo sekvis kontinue suprenirantan linion, dum kontraŭe la vivkostoj senteble malaltiĝis. En jaro 1925 "la diferenco estas tute evidenta kun la indekso 159 por la pograndaj prezoj, 173 por la podetalaj prezoj kaj la indekso 238 por la salajroj".

Ankaŭ la usona laboristo estas multe la plej bone pagata de l' mondo. Manlaboristo perlaboras meze 3—5 dolarojn tage; kvalifikita laboristo 5—10.

La usona laboristo ĝuas vivnivelon superan al tiu de kiu ajn eŭropa laboristo. Kaj la plimulto de l' loĝantaro vivas en kondiĉoj de komforto rezervitaj en Eŭropo al la klasoj privilegitaj: centra hejtado, banĉambro, lifto kaj telefono aplikiĝas en la tuto de l' apartamentoj. Kaj — certe pruvo de l' ĝenerala bonstato — Usono posedis en jaro 1925 mem preskaŭ 20 milionojn da aŭtomobiloj el monda tutkvanto de 24½ milionoj. Tuta laborista familio posedas sian veturilon, ĉiu el la filoj jam maturaj havas la sian. La laboristoj veturas per aŭto al sia laborejo. Kaj estas por eŭropano neatendita spektaklo vidi ĉe la pordo de la fabrikoj kaj de la konstruejoj centojn da aŭtoj ĉiumarkaj. Tie la uzado de l' aŭtomobilo estas tiel popularigita kiel ĉe ni la aplikado de l' biciklo. Jen, cetere, plia okazo konstati, ke Ameriko kaj Eŭropo ne parolas la saman lingvon: kion unuflanke oni nomas lukso, sur la alia estas konsiderata kiel normala ekzist-kondiĉo.

Tiuj ĉi laboristoj, bone pagataj, havas gustojn kaj bezonojn nekonatajn de granda parto el la eŭropa loĝantaro. Konsumantoj same kiel produktantoj, ili estas por la usona grandindustrio unuaranga klientaro.

[1]) Tiu escepta leĝo, nomata en Japanio la "leĝo kontraŭ la danĝeraj pensoj", punas per malliberejo kaj eĉ punlaboro (ĝis 10 jaroj) ĉiun personon, kiu apartenas al unuiĝo, kiu celas la ŝanĝon de l' konstitucio aŭ la forigon de l' sistemo de privatposedaĵo.

Sed kiel tiaj salajroj estas eblaj? — Usono konsistigas interne de siaj limoj grandegan merkaton de 8 milionoj da kvadrataj kilometroj, kaj tio unupece; unu grandega dogan-unuiĝo, kiu etendiĝas de unu oceano al la alia. Kia diferenco je Eŭropo, precipe la postmilita, pikilbarita de doganaj bariloj, kiuj malhelpas kaj senenergiigas la produktadon.

La usona industrio krome komprenis redukti siajn kostojn. La seria produktado estas la plej konata el ĝi procedo; sed ĝi ne estas la sola. La usonanoj scias akiri el la manlaboro sian maksimuman produktokvanton per la lertaĵo de l' tajlorigo tiagrade perfektigita, kiel ne estas konate en Eŭropo. La laborkondiĉoj ĉe Ford donas pri tio okulfrapan ekzemplon. Ĉu oni en Eŭropo povas imagi laboriston, kiu dum sia tuta vivo plenumas la samajn aŭtomatajn movojn kaj pasigas siajn 8 horojn ĉiutage ŝraŭbante la saman ŝraŭbingon al la sama loko per sama lada plato? —

En tiaj kondiĉoj la specialaj karakteroj de l' usona industrio nur povas evidentege kontraŭi tiujn de l' eŭropa produktado. Ne postulu de la unua originalan personan kvaliton, individuan guston aŭ profesian amon. Tio estas propra al la industrio de l' malnova mondo, kiu aperigas individuistan socion kaj artemajn tendencojn. En Ameriko la fabrikado estas antaŭ ĉio kolektiveca, sennoma kaj ĉie simila al si mem: tio estas reala malsupereco.

Por ĉio, kio ne volonte akceptas la serian produktadon, Usono do ne povus elteni la komparon kun Eŭropo. Kaj la dogana baro restas por ilia industrio kiel sendiskuta neceseco. (Finota.)

Laŭ G. Vallée (en "La Granda Revuo", Paris), kompiltrad. N. B.

★

# Letero el Estonio

Ĉe la debatoj pri la ŝtata buĝeto oni konstatis, ke estis utiligataj ĉiuj enspezoj por ekvilibri la buĝeton. Kaj oni ankaŭ konstatis, ke ne estis eble ekvilibri la buĝeton, ĉar la elspezoj ĉiam pli kreskadas kaj la impostpaganto estas ekstreme troŝarĝita. La ŝtatestroj mem tion konstatis per la vortoj: „Postuli de impostpaganto tro multe, signifas ĉesigi lian toleremon kaj tiam . . ." — Por eviti tion, oni trovis alian vojon: la nerektajn impostojn, ne tiel rimarkatajn de la regatoj, kiuj povas kulpigi la fabrikantojn pro altigo de la varprezoj. Trafa ekzemplo estas la kontrakto kun usonsveda alumettrusto pri la monopolo de produktado kaj vendado de alumetoj en Estonio. La registaro ricevas unuoble 3 milionojn da kronoj kaj estas garantiata 7-miliona eksterlanda prunto en svedaj kronoj, kaj la trusto rajtas

ekspluati la popolon dum 28 jaroj. Jam nun montriĝis la rezultoj: antaŭe unu paketo da alumetoj kostis 12—13 sendojn[?][1]), nun 20 kaj pli. — Projektataj estas ankaŭ aliaj similaj monopoloj.

### La "Sennaciuloj"

Kiel konate, troviĝas en la tuta mondo la rusaj elmigrintoj, interalie en Estonio laŭ burĝa informo 18 mil, dum la lando havas 1 150 000 loĝantojn kaj ĉirkaŭe 25 000 industriajn laboristojn. La elmigrintoj sukcese konkuras kun "naciaj" laboristoj, ĉar la entreprenistoj preferas la elmigrintojn pro ilia humileco, toleremo kaj sklavemo. Ili estas kontentaj kun plej malalta salajro, per kiu la estoniaj laboristoj ne scipovus vivi. Tion skribas la burĝa ĵurnalaro.

Ni proletoj devas konkludi el tio, ke la entreprenistoj estas veraj "sennaciuloj": ili estas pretaj dungi kiun ajn, se nur ili gajnas al si profiton, dum la samaj entreprenistoj admonas kun siaj helpantoj la Laboristaron ami sian patrion, nacion, defendi ĝin ĝis la lasta sangoguto. Tio signifas defendi la profiton, bonstaton de fabrikanto, defendi malbonstaton de Laboristaro. Laboristo, konvinkiĝu, ke vi nek patrion nek nacion havas! (10 438)

★

## Purcel pri la hindaj laboristoj

K-do Purcel skribas en Daily Herald 16. 4. (Ĉiutaga Heroldo):

Transpasas mian komprenon, kiel homoj en tiu lando permesis tian teruran staton, kian mi vidis en Hindio, lando kun mirindaj materiaj kaj naturaj riĉaĵoj. El 350 milionoj da loĝantoj proksimume 300 milionoj ne scias skribi nek legi kaj vivas en malvastaj kabanaĉoj sen fenestroj kaj iaj higienaj kondiĉoj, havante plej multe nur kelkajn ŝilingojn semajne por vivteni siajn familiojn. Ilia nutraĵo en plej multaj okazoj konsistas el kelkaj plenmanoj da rizo, kaj estas tute neeble por ili ricevi pli ol la minimumon da vestoj.

La kondiĉoj, sub kiuj la hindaj laboristoj vivas, estas makulo por la civilizacio. La kapitalista klaso malbontraktas la popolon tie, kiel alie, kaj la **hindaj mastroj estas tiel malbonaj** kiel la britaj. La paga elcento de l' hinda laboristo proporcie al la blanka estas 1 : 25. La sola espero por la hindaj laboristoj estas en la sindikat-organizo . . .

[1]) Ni ne komprenas tiun vorton. Refoje ni ĉi-okaze atentigas la verkantojn, ke ili indulgu la Legantaron kaj zorge pripensu la terminojn de ili uzatajn. — Red.

# BLANKA TERORO EN SENDEPENDA POLIO

### Polico dispelas kunvenon de Liberpensuloj

Pri la arestoj dum la kunveno de poliaj liberpensuloj la SAT-anaro verŝajne jam eksciis el la ĉiutaga gazetaro. Kiel delegito al tiu kunveno mi donos kelkajn detalojn, kiuj klare montras, en kiaj politikaj kondiĉoj troviĝas la polia Laboristaro.

Por la 8-a kaj 9-a de aprilo 1928 estis aranĝita en Lodz kunveno de Polia Liberpensula Asocio (sekcio de l' Internacio de Proletaj Liberpensuloj en Vieno), por kiu la asocia estraro en Varsovio havigis al si permeson de la ministerio por internaj aferoj. Oni volis tiuokaze ankaŭ aranĝi grandan publikan kunvenon, dum kiu la delegitoj en 6 lingvoj (pole, germane, blankruse, jude, ukraine kaj esperante) parolus al la amasoj. Sed, kvankam la koncernaj afiŝoj jam estis pretaj, la polico en la lasta momento malpermesis la publikan aranĝon. Restis do nur la kongreskunsido.

La 8-an antaŭtagmeze okazis en la ejo de la komerclaboristoj la solena malfermo en ĉeesto de 126 gedelegitoj, kelkdek gastoj kaj . . . 3 polickomisaroj, el kiuj interŝanĝe 2 restadis dum la tuta daŭro de l' kunveno. Post kanto de Internacio sekvis buŝaj salutoj de diversaj organizoj. Inter aliaj salutis en la nomo de la komunista parlamentfrakcio en Polio deputito K-do Bitner (kun bandaĝita kapo — rezulto de la batoj ricevitaj en la "parlamento"), iu K-do el okcidenta (polia) Blankrusio, kiu atentigis pri la nun en Vilno okazanta proceso kontraŭ Hromada, kaj en la nomo de SAT esperantlingve estrarano de l' esperanta sekcio ĉe la lodza filio de PLA.

Plue estis legataj skribaj salutoj, inter ili kelkaj peresperantaj, por kiuj ni dankas ĉi-loke. Sekvis raportoj kaj interkonsiliĝoj, kiuj por la legantoj de "S-ulo" ne havas specialan intereson. Tiel daŭris 2 tagojn. Estas karakterize, ke la "sinjoroj" polickomisaroj konstante penis trovi "kontraŭŝtatajn krimojn" kaj multfoje haltigis la oratorojn. Fine ili opiniis, esti trovintaj tian "krimon". Okazis tiel: Post aprobo de diversaj rezolucioj (ankaŭ priesperanta, tekston vidu aparte) estis legata rezolucio, en kiu estis postulataj konvinklibero kaj liberigo de 6000 politikaj malliberuloj poliaj kaj estis sendataj salutoj al la nun en Vilno juĝataj batalantoj de la blankrusa kamparana unuiĝo Hromada.

Oni ne sukcesis finlegi la rezolucion, ĉar tiumomente ekstaris polickomisaro kaj ekkriis: "En la nomo de leĝo mi fermas la kunvenon kaj ordonas disiron!"

La kunvenintoj kaj la gastoj responde ekstaris, ĥore kantis Internacion kaj direktis sin al la pordego. Sed la solidara, orda sinteno de la kunvenintoj, precipe la laŭta kantado de Internacio tiel kolerigis la policanojn, ke ili senprokraste — postkiam nur kelkiuj sukcesis eliri — fermis la pordegon, venigis la tutan stabon de la lodza "defensivo" kaj rekondukis nin en la ĉambregon. Tie uniformitaj kaj civilaj "defensiv"-anoj traserĉis laŭvice la poŝojn de ĉiu kunveninto.

Tiu procedo daŭris de la 19-a horo ĝis la 1-a nokte. Kelkdek "suspektindulo]" estis en 2 aŭtomobilegoj forkondukataj arestejon. La plejmulton oni sekvintatage ellasis, sed kelkiuj ankoraŭ ĝis nun (semajnon post la okazintaĵo) sidas en malliberejo.

Dum la kunveno estis ankaŭ aranĝita malgranda esperanto-ekspozicio.

luelmultiuj.

> **Milionoj da esperantaj lernolibroj estas jam disvenditaj, dum esperantaj gazetoj inter la plej legataj havas nur kelkajn milojn da abonantoj.**
>
> **En tio kuŝas la malforteco de nia movado.**
>
> **Kiu varbis unu abonanton al "S-ulo", tiu pli utilis al la esperanta afero, ol se li disvendus dek lernolibrojn.**

★

## Pri malsanula asekuro en Germanio

Mi laboras en granda fabriko kiel maŝinlaboristo. De mia semajna salajro, 38 ormarkoj por 48 horoj, estas deprenataj 1,53 mk. por la malsanula asekura kaso.

Antaŭ kelkaj tagoj mi malsaniĝis kaj ne plu povis labori. De la kaso mi ricevis kuracan kaj medicinan helpon plus subtenon ĉiutagan de 2,95 mk. Laboristo ĉiam nur ricevas la plej malmultekostan kaj malbonan medicinon. La mia kostis 2,70 mk. Ankaŭ oni mem devas pagi 10% da medicina kosto. Sed eĉ tio jam verŝajne estis tro alta elspezo por la kaso. Post oktaga malsano la estro de la asekura kaso irigis min al la fabrika kuracisto (speciale pagata de la firmo). Tiu altkreska "filantropo" esploras la malsanulojn kiel bestojn. Rilate al mi li same agis, mi sentis min kiel en milita esplorejo, por esti nomata "militkapabla" (en germana lingvo oni por tio havas la mallongigon "K. V."). Kvankam mi ankoraŭ estis malsana, tiu "ankaŭ"-kuracisto deklaris min laborkapabla kaj sana. Li raportis tiasence al la administrejo de la kaso. Ĉar ju pli da malsanuloj li deklaras laborkapablaj,

des pli alta estas lia tarifo. Ĉu ekzistas pli profitdona negoco?

Tiu metodo estas tre ofte aplikata de la malsanul-asekuraj administrejoj, por malaltigi la nombron de malsanuloj. Speciale la fabrik-kasoj estas la plej malbonaj, ĉar por la fabrik-direktoroj ja ne ekzistas homoj aŭ laboristoj, sed nur objektoj, profitiloj.

Mi kompreneble devis eklabori laŭ la atesto de l' fabrikkuracisto; aliel mi estus maldungita kaj konsiderata kiel "ŝajniganto". Kompetenta nur estas la fabrikkuracisto, aliaj ne estas rekonataj. Se akcidentoj okazas en la fabriko, ĉiuokaze la laboristo estas kulpigata pro malatento. Teorie la asekura leĝo bonaspektas, sed praktike ne helpas al laboristo. La asekura administracio kompreneble preferas, se laboristo pagas siajn kotizojn laŭorde, neniam malsaniĝas kaj laboras, ĝis li mortaĉas en la laborejo aŭ iamaniere.

Liberecano (4160).

**GRANDA KONGRESAFIŜO**

trikolora

aperis por varbi al nia 8-a Kongreso en Göteborg

**ĈIU PROPAGANDISTO tuj havigu al si senpage per la Kongr. Komitato, Box 73, Göteborg.**

## TRIMIL TRICENT SEPDEK NAŬ TAGOJ EL MIA VIVO

(Fino)

Kion do diris la instruista klaso, la gardantoj de l' klereco, kiam frenezaj fanatikuloj metis la pugnojn kontraŭ ĝia intelekta libereco?

Ĝi restis muta kiel ŝafido al buĉo tirita. En la islanda instruista klaso vi nur trovas malkuraĝajn panakirantojn sen ia pli nobla idealo.

Nun mi verkis tre longan kaj akran artikolon, kiun mi nomis Eldvigslan (La fajra inaŭguro). Ĝi aperis en socialista gazeto kaj estis legata en ĉiu domo de la lando, kaj ĝi faris grandan efikon.

Post tiuj ĉi faroj, la 3-an de decembro 1925, mi veturis al Svedio kaj restis en Stokholmo dum la vintro. Tie mi studis politikon, beletristikon kaj svedan popolkarakteron. En majo mi vojaĝis de Stokholmo al Danio kaj restis en Kopenhago ĝis la 28-a de julio. En tiu ĉi supernerva urbo mi studis "popolmemoraĵojn", ĉar la Karlsberga fondo proponis al mi malgrandan subtenon por kolekti tian sciencon en Islando. —

En Islando mi havas bonan amikon, lertan kuraciston, kiu lastan aŭtunon aliĝis al SAT. Li estas lerta politika gvidanto kaj granda saĝulo. Li lernis esperanton tre bone antaŭ dekok jaroj. De tiam li ĉiam legis esperantajn librojn kaj gazetojn. Pro lia influo mi komencis lerni esperanton en la printempo de jaro 1925. Dum tiu somero mi legis malgrandan lernolibron kaj unu fabelon de H. C. Andersen. En Stokholmo mi aĉetis multajn esperantajn librojn, sed mankis tempo por esperanto-studado. Veninte al Kopenhago, tiu penso okupis mian cerbon kun forta konvinko, ke mi devas lerni esperanton tiel bone kiel mian patran lingvon kaj fariĝi esperanta verkisto. La sperto lernigis al mi, kiom da tempo la islanda popolo oferas por lingva studado, ofte sen ia rezulto; kiajn barojn prezentas la lingva diverseco por internacia komunikado. Kaj la esperantista idealo ravis mian intelekton. Sed mi ne povis elporti rigardi senlabore la bataladon de tiu ĉi grandioza idealo. Mi sincere deziris helpi laŭ mia malgranda povo kaj malbona situacio. Kaj senprokraste mi komencis denove mian esperanto-studadon. En Kopenhago mi renkontis kelkajn helpemajn esperantistojn. Inter ili mi unue provis paroli esperanton.

Mia ĉiutaga laboro estas jena: Skribi artikolojn por la socialistaj gazetoj kaj revuoj pri politikaj aferoj, filozofiaj problemoj kaj esperanto, studi socialismon, religiojn, filozofion kaj beletristikon, kolekti vortojn el la popola lingvo kaj popolmemoraĵojn. Precipe

## Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

STUDO

(Daŭrigo dudektria)

### Kiel oni kreas patriotan ideologion

Oni kvazaŭ ĉeestas la naskiĝon de novaj nacioj. Kaj la patriotismo estas la nuntempa religio, kiu plej bone kaj facile disvastiĝas en ĉiuj mondpartoj. Per laŭcela edukado la ŝtatoj de Sud-Ameriko, ekzemple, kreas patriotan senton, kies malutileco baldaŭ estos komparinda kun tiu jam delonge ekzistanta en la Eŭropaj landoj. Estas vere mirige konstati, kiel filoj de italoj, de francoj, de irlandanoj, de turkoj aŭ de orientanoj fariĝas bonaj patriotoj — ĉiliaj, peruaj, kolombiaj, braziliaj, argentinaj k. c.

La fakto estis, antaŭ du jaroj, tre bone raportita de s-ro Alfred Bernier, korespondanto de la burĝa Pariza ĵurnalo La Tempo. Tiu ĵurnalisto kompreneble tre simpatias al la patriotismo; sekve por nia tezo lia atesto estas despli atentinda kaj valora:

"Kie la tradicioj ne ankoraŭ ekzistas, kie la historio estas apenaŭ cent-dudekjara, tie popolo povas ekzisti kun nacia unueco nur kondiĉe, ke konstanta edukada penado anstataŭu la mankantan pasintaĵon per intensa kulturado de ĉi tiu idealo: la patrio. Tion bone komprenis la regantoj..."

"La instruado, kiel ĉie, dividiĝas en tri periodojn... Precipe dum la unua periodo, kiu daŭras ses jarojn, la juna lernanto ricevas sian patriotan edukadon; la edukanto ja bone scias, ke la sentoj enradikigitaj dum tiu delikata aĝo estas por la estonto la plej fruktodonaj semoj. Tuj ĉe lia eniro en la lernejo, la knabo samtempe lernas legi kaj kanti la nacian himnon. Ĉiutage oni parolas al li pri la heroaĵoj kaj meritoj de la grandaj liberigantoj de 1810, pri la furiozaj bataloj por la sendependiĝo; la nomoj de San-Martin, Moreno, Belgrano, ktp. por ĉiam gravuriĝas en lian memoron; oni kondukas la estontajn civitanojn per pia pilgrimado antaŭ la statuojn de tiuj herooj, kiuj staras sur preskaŭ ĉiuj placoj de Buenos-Aires kaj de la aliaj plej gravaj urboj; iu oratoro laŭdegadas ilian vivon, kiu estis tute dediĉita al la sola servado al la patrio, kaj tiel la knaboj, nenion sciantaj pri la aliaj gloroj el la mondo, akiras la nedetrueblan konvinkon, ke Argentino estas la plej bela, la plej fama el ĉiuj nacioj. Sendube tio estas iom troa, sed tio donas fruktojn kaj tre belajn fruktojn."

"Nur la historio pri Argentino estas instruata en la unuagradaj lernejoj, la instruado pri ĝenerala historio okazas ekskluzive en la duagradaj kaj superaj lernejoj (t. e. ke nur la elementoj, kiuj konsistigos la regantan klason, havos pli objektivan mondpercepton. E. L.)."

— — "Tiele edukita, la knabo plej forte akiras tre fieran ideon pri sia naskiĝlando kaj ties grandaj homoj, kiuj ĝin glorigis. Ĉiutage li kantas: Al gran pueblo argentino, salud!" (Al la granda popolo argentina, saluton!).

La aŭtoro detale priskribas ĉiujn rimedojn, uzatajn de la tieaj regantoj por encerbigi profunde patriotismon. Estas ceremonioj, manifestacioj, procesioj ktp. okaze de la naciaj festoj. Li notas, ke, kvankam la konstitucio de la lando konsentas la presliberecon, tamen ekzistas opinio konsiderata kiel nepre puninda: la patri-ofendo. Kun aprobo nia burĝo notas konklude:

"Post ses jaroj da instruado tiom intensiva, la knabo estas varbita por Argentino, kaj la ideo pri patrio superregas en lia spirito ĉiujn aliajn kon-

mi oferis kaj ankoraŭ oferas longan tempon por esperanto-studado, ĉar, kiel dirite, mi celas skribi lingvon internacian tiel bone kiel mian patran lingvon. Sed por islandano tia tasko estas multe pli malfacila ol ekzemple por franco, anglo aŭ germano, ĉar la islanda lingvo estas tre malsimila al tiuj lingvoj, el kiuj esperanto estas precipe konstruita. Nun mi verkas island-esperantan vortaron kun kelkaj konatoj. Al kelkaj personoj mi instruis esperanton.

* * *

Mi ĝenerale vekiĝas ĉirkaŭ la oka horo. Tiam mi komencas labori, legi aŭ skribi en la lito. Intertempe mi kolektas vortojn kaj esprimojn el libroj de Zamenhof. Je la deka horo mi ellitiĝas, faras ekzercojn de J. P. Müller kaj prenas banon aŭ naĝas en maro. Je la dekdua horo mi manĝas kaj diskutas politikon kun miaj sammanĝejanoj. Je la dektria mi hejmeniras kaj skribas aŭ legas ĝis la deknaŭa horo. Tiam mi vizitas razejon kaj tie legas gazetojn. Post la razado mi vespermanĝas. Dum la vesperoj mi priparolas aŭ diskutas diversajn aferojn kun konatoj, ekzemple politikon, esperanton, filozofion, teozofion, literaturon, psikologion ktp. Ofte mi ankaŭ rakontas historiojn aŭ prezentas biografiajn skizojn. Ĉirkaŭ la dudekkvara mi kuŝiĝas en mian liton kaj legas ĝis la unua horo. Tiam mi ekdormas, se mi povas. Iafoje mi kuŝas maldorma ĝis la tria aŭ kvara horo. Dum junio kaj julio mi povas legi aŭ skribi la tutan "nokton" en hela taglumo. Ofte en la noktoj min vekas preskaŭ sovaĝa entuziasmo, kiu min pelas skribi, ĝuste kvazaŭ ia fantomo, dio aŭ diablo baraktas en mia tuta animo. Kaj humile mi estas devigata obei la mistikan tiranon kaj skribi senĉese dum du ĝis tri horoj.

En Edinburgo mi unue legis pri SAT. En sama momento mi fariĝis SAT-ano kaj abonis "S-ulo"-n kaj "Sennaciecan Revuo"-n. Mi tute estas sennaciulo, eĉ universano. Ĉie, kie suno lumas kaj herbo kreskas, estas mia hejmujo. Mi propagandas sennaciismon laŭ mia povo. Spirite islandanoj estas internaci- kaj sennaciemaj. Sed tie ĉi estas malmultaj esperantistoj. Tial nur tri individuoj aliĝis al SAT. Sed nuntempe esperanto ekprogresas bone en Islando. Kaj mi kredas, ke en la estonto multaj islandanoj iĝos membroj de SAT, precipe se ĝi sukcesos eldoni instruajn kaj bonstilajn gazetojn kaj revuojn kaj publikigi librojn de literatura valoro.

* * *

Bedaŭrinde multaj esperantaj libroj, gazetoj kaj revuoj ne prezentas efektive bonan kaj amuzan stilon. Ŝajnas al mi, ke krom la genia Zamenhof, proporcie malmultaj esperanto-aŭtoroj verkas bonstilajn legaĵojn. Multaj el niaj verkistoj esprimas siajn pensojn peze, mallerte kaj ne klare. Ili ofte amasigas en unu vorton tro multe da radikoj. Tio faras la vortojn longaj kaj malgraciaj. La vortordo ofte estas absurda kaj similas diversajn stultegajn esprimmodojn de naciaj lingvoj. La frazoj ofte estas tro longaj, malsimplaj kaj malklaraj. La esprimoj ne varias sufiĉe. Kaj tempoj de verboj multfoje estas tro komplikaj en la sama frazo. Pro tiu ĉi neperfekteco la legaĵo fariĝas malflua, neklara, malfacila kaj perdas efikon.

En miaj librujoj troviĝas kelkaj esperanto-libroj, kiuj estas tiel malbonstilaj, ke mi tute ne komprenas ilian enhavon. Inter tiaj volapukaĵoj mi volas mencii libron de Henri Barbusse: Eklumo en la abismo. Trifoje mi provis legi ĉi tiun libron. Sed laca kaj kolera mi ĉiam devis ĉesi. Por miaj oreloj ĝi sonas kiel nekomprenebla korvolingvo. (La unua frazo de la libro aspektas tiel: "Tiuj, kiuj estos vivintaj ĉi tiun epokon, kiuj estos pasintaj flanke aŭ tra la milito, komenciĝinta en 1914 por fini, oni ne plu scias kiam, estos ĉeestintaj la faladon de unu civilizacio kaj la finiĝon de unu mondo!" Tiel parolas la tuta libro. Kial oni publikigas tiel tute nelegeblan tradukaĵon?) Laŭ mia primitiva opinio oni presigas librojn por legado. Se mi pravas en tio, ili devas esti facile legeblaj kaj kompreneblaj, almenaŭ se ili faru utilon al neklera Proletaro. Ordinara homo ne havas okazon aŭ paciencon malŝpari sian tempon por neklara kaj afekta pedanteco. Se la aŭtoroj verkas nacilingve la tradukotaĵojn tiel idiote, la tradukantoj devas ŝanĝi iliajn librojn en simplan kaj kompreneblan homan lingvon. La malmodernan, stultan kaj pedantan "sciencostilon", kiu en malnovaj tagoj okupis la akademian mondon kaj ankoraŭ ŝarĝas mensojn de multaj germanaj aŭtoroj, ni, modernaj revoluciuloj, devas elpeli por ĉiam el nia esperanto-literaturo. Libroj ekzistas por legantaro. Sed la legantaro ne estas kreita por rompi sian cerbon en infana pedanteco de putraj akademianoj.

Tiun ĉi flankan rimarkon mi faris pro tio, ke mi estas adepto de l' esperantomovado, kaj esperantaj libroj okupis longan tempon el miaj lastaj trimil tricent sepdek naŭ tagoj. Mi plie deziras, ke tiu ĉi grava idealo de l' esperantistoj kiel eble plej baldaŭ veku kaj venku la apatian homaron. Kaj mi estas konvinkita, ke nia plej bona helpilo estos bonstila, amuza kaj utila literaturo.

Hodiaŭ estas la unua de januaro 1928. La suno pendas sangruĝa malalte sur la ĉielo. Neĝo falis. Silentaj kokoj paradas malrespekte antaŭ mia fenestro. Lacemaj homoj paŝas peze laŭ la strato post tromanĝado en festotagoj de l' savinto de la animo. Mi sidas apud la skribotablo kaj aranĝas malnovajn vortojn, ehon de mortintaj tagoj.

Jen pasis trimil tricent sepdek naŭ tagoj el mia vivo.

Torbergur Tordarson (7604).

---

ceptojn de lia juna cerbo; dum la marŝado de l' tempo tiu patriota sento ankoraŭ pligrandiĝos kaj fine, kun la fieregeco de Romano: civis romanus sum, li diros: 'Mi estas Argentinano!'"

La citita ekzemplo tre trafe montras, kiel artifike oni kreas ideologion; ĝi komprenigas kiom da forto havas la ideoj, kiom potenca estas la edukado. Ni kompreneble scias, ke la ideoj havas ĉiam materian subtenilon, almenaŭ ĉe sia naskiĝo. Sed estas ankaŭ ni klara, ke ili havas propran vivon, kiu povas daŭri longe post kiam malaperis ilia materia, denaskiĝa bazo.

Por ke la edukado povu atingi tian rezulton, necesas, ke ĝi sin apogu sur la mistika tendenco, kiu ankoraŭ regas en la grandega plimulto el la cerboj. La mistika esenco de l' patriotismo montriĝas per la absoluteco de ĝia moralo. La naciismo estas eĉ la sola religio, kiu postulas nuntempe de la homo vivoferon. Post jarcentoj da luktado la homoj akiris la rajton aparteni aŭ ne al iu eklezio, la liberecon ĉeesti aŭ ne religiajn ceremoniojn. Sed neniu povas senpune rifuzi partopreni en la sangaj ceremonioj, la militoj, kiujn okazigas periode la diversaj naciismoj. La patriotismo estas nuntempe la plej potenca ideologio; ĝi pasiege superregas la spiritojn kaj kapablas fari el pacemaj kaj bonkoraj homoj batalemajn kaj sangavidajn bestojn.

La dek kvin milionoj da buĉitoj el la lasta mondmilito ne sufiĉis por satigi la monstron. La patriotismo daŭre minacas la homaron.

(Pluo sekvos) E. Lanti.

**Ekzistas ankoraŭ multaj laboristaj esperantistoj, eĉ SAT-anoj,**
kiuj pli malpli malaténtas sian klasan devon, ĉu kunlaborante al neŭtralaj organoj, ĉu informante ilin prefere ol Sennaciulo-n, ĉu alimaniere. Tial ni kontentas sciigi, ke ree estas havebla la bonega varba broŝuro de K-do E. Lanti

**FOR LA NEŬTRALISMON!**

**3-a eldono**

plivastigita, 32-paĝa, enhavanta krom la aldonoj de la 2-a eldono ankoraŭ novan enkondukan parolon de l' aŭtoro kaj tre koncizajn kaj trafajn difinojn pri "sennaciismo, patrio, revolucio" k.a.

**Prezo: 0.30 mk. g.**

Mendu ĉe la Administrejo:
**R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

# TRA ESPERANTIO

## El la Redaktejo

*Okaze de la 1-a de majo ni ricevis multajn flamajn alvokojn, batalsalutojn kaj venkdezirojn, kiujn ni kompreneble ne povas publikigi, unue pro manko de loko kaj ankaŭ pro tio, ke ili taŭgas nur por politikaj agitecaj ĵurnaloj. Dank' al la favoro de nia financministro ni povis liveri al la Legantaro okaze de la 1-a de majo 12-paĝan numeron de "S-ulo", tiel ke ni sukcesis elĉerpi iom pli ol kutime el la abunde ricevita materialo. Aliflanke ni denove akcentu, ke la limigita spaco devigas nin elekti nur vere interesajn kaj originalajn artikolojn por nia organo. Tradukojn aŭ lokajn okazintaĵojn ni nur plej malofte povas utiligi, kaj rilate al la "Tagoj" ni estos devigataj, elekti nur tiujn, kiuj prezentos ion speciale originalan. Ni ja ne deziras tedi niajn legantojn per ripetadoj.*

*Kio karakterizas ĉi tiun numeron, estas la abunda priesperanta materialo, kiu ne toleras prokraston, la raportoj pri la multaj landaj kongresoj, kiujn okazigis la aktivaj poresperantaj asocioj dum la paskaj tagoj, kaj la pritrakto de la gravaj organizaj demandoj, kiuj ankaŭ formis parton de la tagordo dum tiuj kongresoj. — Tial ni devis formeti aŭ prokrasti alian bonan materialon, kiun ni ricevis.* N. B.

## LA 7-A JARKONGRESO DE ALLE

Dum la paskaj tagoj okazis la delegitara kongreso de la Aŭstria Laborista Ligo Esperantista en Vieno, kiun ĉeestis 73 delegitoj reprezentantaj 169 membrojn el 33 grupoj de ALLE el tuta Aŭstrio. Post la salutparoladoj de diversaj delegitoj, el kiuj mi citas la Socialdemokratan Partion kaj K-don 9592, kiu je la nomo de la Aŭstriaj SAT-anoj salutis la kongreson kaj samtempe transdonis 33 ŝilingojn kiel profitrestaĵon el la V-a SAT-kongreso. La raportoj de la funkciantoj rapide estis finitaj; ĉion oni akceptis unuvoĉe. La plej interesa el la tuta tagordo estis la 4-a punkto "Ni kaj la Partio", la 5-a "Ni kaj la burĝa esperantista movado" kaj la 6-a punkto, kiu nin SAT-anojn plej interesis: "La internacia proletara esperantista movado". Pri la 4-a K-do Prof. Simon, la prezidanto de ALLE, raportis. La parolado enhavis riproĉadon kontraŭ la Partio (Soc. dem.), kiu neniel volas rimarki la gravecon de la laborista esperantista movado.

Poste sekvis la parolado pri la burĝa esperantista movado. La iama SAT-ano Klatil kun granda ĉagreno konstatis, ke la "neŭtralaj" esperantistoj ĉiam je la nomo de la tuta esperantistaro agadas, kvankam la laboristaj esperantistoj tute ne konsentas kun ili. Li tuŝis ankaŭ la oftan necesecon de la kunlaborado kun neŭtralaj esperantistoj. Lia parolado efektive estis nek por nek kontraŭ la burĝa movado. La alparoloj ĝenerale estis kontraŭ la kunlaboro, la publika rifuzo unuvoĉe estis akceptata, kaj en la dua parto — la kunlaboro en komuninteresaj aferoj — dum la voĉdonado 112 voĉoj estis por kaj 26 kontraŭ.

Pri la 6-a punkto K-do Jonas raportis. Li laŭtlegis la SAT-cirkuleron senditan laŭ la decido de la 7-a SAT-kongreso al ĉiuj LEA-oj. Poste li skizis la tutan strukturon de SAT kaj tre ofte citis la agadon de tiu alia "tendenco" (kom-istoj), kiuj laŭ lia aserto regas la tutan SAT-on (??!!). Ĉe la fino li laŭtlegis tezojn responde al la cirkulero. La tezoj donas la eblecon por pliproksimigo inter ALLE kaj SAT. La tezoj unuvoĉe estis akceptataj.

El la akceptitaj proponoj mi citas la plej interesan kaj imitindan por ĉiuj LEA-oj. "La 7-a kongreso de ALLE decidas, ke neniu el ĝiaj membroj povas samtempe esti membro, nek de enlandaj, nek de eksterlandaj 'neŭtralaj' burĝaj esperantistaj societoj." Tiu ĉi propono kun granda entuziasmo estis akceptata.

La sekvonta kongresurbo estas Vieno.

J. Batta (246).

## LA 8-A KONGRESO DE "LABORISTA ESPERANTISTA FEDERACIO" (FEO) EN FRANCIO

La "Fédération Espérantiste Ouvrière" (FEO) kongresis la 8. kaj 9. aprilo en Bourges. 18 grupoj estis reprezentitaj. Proksimume 60 gek-doj partoprenis la kunsidojn, prezidatajn de K-do Rival, sekr. de la grupo en Saint-Etienne. Alvenis 18 salutleteroj, telegramoj kaj multegaj poŝtkartoj. K-do Herviet, sekretario de la Laborborso, salutis la kongresanaron je la nomo de la lokaj sindikatoj kaj esprimis bondezirojn por la progreso de nia movado. Post vigla, sed kamaradeca diskuto la diversaj raportoj prezentitaj de la estraro estis aprobataj. Sufiĉe kontentiga ja estas la laboro farita, ĉar dum la lasta jaro la anaro preskaŭ duobliĝis: 728 membroj lastdecembre kontraŭ 420 fine de j. 1926.

K-do Boubou, instruisto, longe raportis pri la instruado de nia lingvo, laŭ propraj spertoj. Estas decidite la eldono de perfektiga kurslibreto por la koresponda kurso, laŭ miksita uzo de la dua parto de nia "Plena Racia Kurso" kaj "Petro". La raportanto verkos konsilojn por la gvidado de parolaj kursoj. Koncerne la propagandon la Kongreso esprimis la deziron, ke SAT eldonu grandkvante ilustritan afiŝon kun mallonga, por ĉiu komprenebla teksto esperanta kaj loko por surglui nacilingvan tekston.

La letero de la EK de SAT al la LEA-oj okazigis mallongan debaton, ĉar ĉiuj franclingvaj grupoj unuanime opinias, ke estas ne trafe devigi nuntempe aliĝon al ambaŭ organizoj. Konsente kun la ĉeestantaj membroj de la Direkcio de SAT, la kongresanoj akceptis unuvoĉe projekton preskaŭ similan al tiu de la estraro de GLEA[1]). Laŭ propono de K-do Lanti oni unuanime akceptis aldoni al la statuto de FEO iun mallongan tekston, kiu kvazaŭ devigas la Federacion oficiale interrilati kun SAT.

Diskutinte pri oportuneco ŝanĝi la sidejon de la Federacio, la Kongreso decidis lasi ĝin en Parizo, kaj reelektis K-don Cachon kiel sekretarion.

Laŭ raporto de SAT-ano 24.

[1]) Oni legu la tekston pĝ. 253. — Red.

## JARA KONGRESO DE BRITA LAB. ESP. ASOCIO (BLEA) EN ŜEFILD (SHEFFIELD)

Kiel enkonduko por la jara kongreso de BLEA en Ŝefild okazis 7. aprilo sukcesa kunveno, en kiu partoprenis proks. 140 delegitoj de laboristaj organizoj. La prezidanto de la loka sindikataro substrekis la gravecon de esp-o por detrui la barilojn de lingva diverseco inter proletoj. K-dino M. Dunn priparolis la utilecon de la lingvo por ŝi dum sia lastatempa vizito al Sovetio. K-do M. Starr en parolado deklaris, ke esp-o plej sukcese estas aplikata je servo de la Proletaro. La afiŝoj, ĵurnaloj ktp. bone impresis la vizitantojn, kaj la ĵurnaloj enhavis notojn pri la ekspozicio.

La ĉefa decido de la BLEA — kunsido estis "ke BLEA simpatie akceptas la proponon de la SAT-Ekzekutivo pri reciproka helpo kaj agado inter SAT kaj la propagandaj lingvoregionaj asocioj kaj promesas ŝanĝi sian statuton konforme, se la 8-a Kongreso de SAT en Göteborg akceptos". Laŭ la propono de la Ekzekutivo de SAT estis elektata reprezentanto por aranĝi la aferon. Raportoj estis ricevataj el Manĉester, Bradford, Edinburgo, Hartelpul, Lids, Londono kaj Ŝefild, kie funkcias malgrandaj, sed viglaj grupoj. La kresko de la brita SAT-anaro fortigas la esperon, ke almenaŭ la 10-a Kongreso okazu en Londono. La Joung Socialist daŭrigas sian notaron, ankaŭ la New Era (grava progresema ĵurnalo kvaronjara) sian lecionaron. La NCLC decidis sendi delegiton al la konferenco en Göteborg, pri kiu aperas artikoloj en lab. ĵurnaloj. La kuranta programo de la Londona Lab. Klubo estas havebla.

## Dokumentoj

### La Ekzekutiva Komitato de SAT al la estraroj de la LEA-oj

31. 1. 1928.

Estimataj Kamaradoj!

Vi sendube scias, ke la 7-a Kongreso de SAT, kiun ĉeestis reprezentantoj de kelkaj landasocioj, komisiis nin interrilatiĝi kun ĉiuj por-esperantaj asocioj laboristaj kun la celo trovi interkonsentan bazon por pli intima kunlaborado.

Antaŭ ol fari al vi konkretajn proponojn, ni skizetu ĝeneralan bildon pri kondiĉoj kaj cirkonstancoj en kiuj malvolviĝas la laborista esperantista movado.

Kiel ni, vi certe scias, ke ne en ĉiu lando ekzistas por-esperanta asocio laborista. Kaj en la landoj, kie ekzistas tia asocio, ne ĉiu asocio estas tute sendependa de la burĝaj asocioj, rilate propagandilojn kaj instruilojn. Estas ankaŭ bone konate, ke la politikaj cirkonstancoj tre diversas laŭ la landoj. Sekve la propaganda-kondiĉoj ankaŭ tre malsimilas. Estus do tute ne trafa la provo internacie unuecigi la por-esperantan propagandon.

Sed, se tia unuecigo estas neebla, ne sekvas de tio, ke ne devus ekzisti nacilingvaj asocioj por propagandi esperanton. Neniam SAT celis iel konkurenci al ili. Povas esti ke kelkaj SAT-anoj havis tiun celon, sed neniam ili trovis aprobon niaflanke.

La ideala solvo de la demando prezentiĝas al ni jene: por propagandi kaj instrui

esperanton ekzistu en ĉiu lingvo-regiono aparato nacilingva, kiu limigu n e p r e sian agadon al la propagando kaj instruado.

Ĉar la sperto jam de longe montris, ke ne sufiĉas propagandi kaj instrui la lingvon por ke prosperu la esperanta movado, ekzistu tutmonda aparato, kiu ebligu la tujan utiligadon de la lernita lingvo.

Jam de pli ol ses jaroj ekzistas tia aparato: ĝi estas SAT, kiu pruvis sian taŭgecon kaj vivkapablecon per multege da faktoj.

Sed ni ankaŭ bone scias, ke la nacilingvaj asocioj havas intereson kaj profiton interŝanĝi opiniojn pri la instruado, pri la propagandmetodoj ktp. — Unuvorte utilus la ligilo inter la nacilingvaj aparatoj.

Kiel logikan konsekvencon de la ĉi-supraj ĝeneralaj konsideroj, ni submetas al via juĝo jenajn konkretajn proponojn:

1. Konsiderante, ke la nacilingvaj esp. asocioj kvazaŭ formas la rezervujon por la tutmonda esp. asocio (SAT), ĉiu laboresperantisto klopodu, ke la interrilatoj estu la plej intimaj inter ambaŭ organoj.
2. Ĉar la taskoj inter ambaŭ organoj estas malsamaj, necesas, por eviti konfliktojn, ke nur SAT plenumu la taskon de peresperanta laboro, kaj la landaj asocioj nur tiun de poresperanta laboro.
3. Per sia kooperativo SAT eldonu ĉiujn esperantlingvajn presaĵojn. La nacilingvajn presaĵojn (propagandilojn kaj instruilojn) ankaŭ kun miksita teksto, eldonu la landaj esp. asocioj.
4. Por ke la efektiviĝo de tiuj proponoj povu okazi glate kaj laŭregule, ĉiu nacilingva asocio elektu dum sia kongreso unu membron, kies tasko estu konstante interrilati kun la SAT-estraro en la celo trovi la plej bonan solvon pri demandoj interesantaj ambaŭ organizojn. Tiu elektota peranto havu en la gvidantaro de SAT la rolon de konsulta membro. Saman rolon li ankaŭ havu en via estraro.
5. Okaze de konfliktoj decidas la "Sennacieca Konsilantaro de SAT; se ĉi lasta ne trovas kontentigan solvon, tiam la kongreso de SAT findecidu.
6. Por forigi la nuntempan kaoson inter la diversasociaj membroj, ĉiu landa asocio enkonduku 2 kategoriojn de membroj: a) aktivaj, b) subtenantaj.
7. La landaj asocioj membrigu en SAT ĉiun aktivan membron. La jara kotizo po membro de la landaj asocioj estas minimume 1.80 mk. g.
8. La landaj asocioj enkasu tiujn kotizojn kiel kutime kun la ordinaraj asociaj kotizoj, t. e. 0.15 mk. g. pomonate.
9. Ĉiumonate la landaj asocioj transsendu tiujn kotizojn kolektive kun kompleta listo al la Adm. de SAT, kaj ĉi-lasta sendu la membrokartojn kolektive al la diversaj administrejoj de la landaj asocioj, kiuj zorgas pri la plua disdonado.
10. Komprenęble, nur tiuj membroj rajtu ricevi la jarlibron de SAT, kiuj plene pagis sian jaran kotizon. Por ne ŝarĝi la Administranton de iu landa asocio, la ekspedado de la jarlibroj okazu flanke de SAT.
11. Sekve ĉiu aktiva membro de la landaj asocioj estu samtempe aktiva membro de la tutmonda asocio (SAT) kaj konsekvence rajtu uzi la servojn de SAT (vidu la statuton).
12. Ĉiu izola membro de SAT, t. e. ne apartenanta al iu landa asocio, aŭ en landoj kie ne ekzistas landa esp. organizo, pagu jaran SAT-kotizon de 2.50 mk. g., pageblan je unufojo.
13. SAT disponu al la LEA-oj lokon en S e n n a c i u l o por eventualaj informoj, — la saman rajton permesu al SAT en sia gazeto la LEA-oj.

Konklude ni aldonu, ke nia sola celo estas la prospero de la esp. labor. movado entute. Ni estas firme konvinkitaj, ke ĝi povas ekzisti nur se la poresperantaj nacilingvaj aparatoj kaj la peresperanta (SAT) funkcias tute a p a r t e, f a k e c e, kaj tamen havante amikajn kaj konstantajn interrilatojn.

Ni do petas vin afable diskuti pri la enhavo de nia letero en iu via proksima kunveno kaj konigi al ni vian opinion pri ĝi, farante rimarkojn aŭ kompletigojn, se bezone. Tiele ni povas fininterkonsenti por ke ĉe via proksima kongreso vi povu komisii K-don por subteni vian vidpunkton ĉe la 8-a SAT-kongreso.

Atendante vian respondon, ni salutas vin fratece kaj sennaciece.

Por la EK de SAT.
La Prezidanto: E. L a n t i.
La Sekretario: G l o d e a u.

---

Al tiu letero respondis: 1. Sveda Lab. Esp. Asocio: ĝenerale aprobas; 2. Hungara Esp. Soc. Laborista: ne pritraktas pro la tieaj malfavoraj cirkonstancoj; 3. Lab. Esp. Societo "Laboro" en Pollando: ĝenerale aprobas; 4. Latvia Lab. Esp. Societo: ĝenerale aprobas; 5. Nederlanda Federacio de Lab. Esperantistoj: antaŭ ol pritrakti la aferon, petas ke la EK publike malaprobu la SAT-grupojn el Nederlando, kiuj faras poresperantan laboron; 6. De la Estraro de GLEA (Lab. Esp. Asocio por germanlingvio) ni ricevis jenan kontraŭprojekton kun la peto pri publikigo:

**Proponoj por interrilatoj inter SAT kaj LEA-organizoj**[1])

1. Sama kiel en projekto de EK de SAT.
2. Ĉar la taskoj inter ambaŭ organoj estas malsamaj, necesas, por eviti konfliktojn, ke SAT principe plenumu la taskon de peresperanta laboro, kaj la landaj asocioj principe tiun de poresperanta laboro.
3. Sama kiel en projekto de EK de SAT.
4. Sama kiel en SAT-projekto. Nur la lasta frazo tekstas: "Saman rolon li ankaŭ havu en la estraro de la sialanda esp.-asocio."
5. Okaze de konfliktoj decidas la "Sennacieca Konsilantaro" de SAT komune kun la "Plivasta Estraro" de koncerna lingvoregiona organizo; se ĉi lastaj ne trovas kontentigan solvon, tiam solviĝu la konfliktoj en speciala kunsido de landaj reprezentantoj kune kun la gvidantaro de SAT okaze de SAT-kongreso, kaj en e k s t e r o r d i n a r a j okazoj findecidu referendumo inter la membraroj de SAT kaj koncerna lingvoregiona organizo.

[1]) Intertempe ni sciiĝis, ke la GLEA-kongreso en Nürnberg (v. rap. en n-o 186) ne findecidis pri la projekto prezentita de la asocia estraro. Oni decidis, ke por pridiskuti la proponojn la tekstoj de ambaŭ projektoj (de EK de SAT kaj de GLEA-estraro) estu sendataj al ĉiuj LEA-grupoj.

6. En ĉiu LEA-grupo ekzistu speciala SAT-rondo, kiu plenumu la peresp-an kaj por-SAT-an laboron en la kadro de la grupo; la estro de la LEA-grupo havas la devon, ĉiujare en januaro reelektiĝi gvidanto(j)n de la SAT-rondo.
7. La LEA-grupo okazigu interŝanĝe LEA-kaj SAT-kunvenojn (ĉi lastajn rajtu partopreni ankaŭ ne-SAT-anoj, sed ne kun ia decidrajto en SAT-aferoj).
8. La SAT-rondo havas la taskon, kolekti SAT-kotizojn, abonojn al SAT-organoj, entute plenumi ĉiujn peresp-ajn kaj por-SAT-ajn aferojn (enkasado de SAT-kotizoj kaj kolektado de abonoj al SAT-organoj prefere okazu pere de la subkasistoj de l' LEA-grupo, kiuj fine ordigos tiujn aferojn kun komisiita SAT-ronda gvidanto aŭ kasisto).
9. La gvidanto de la SAT-rondo estu samtempe la loka peranto de SAT kaj respondeca por la peresp-a kaj SAT-a laboroj (nepre ekzistu en ĉiu grupo anstataŭanto de la peranto, por ne interrompi la laborojn aŭ ŝarĝi la LEA-grupon mem).
10. La SAT-rondo ne havu specialajn kotizojn, sed ĉiuj aferoj estu ordigataj en kadro de la LEA-grupo; ĉ i u SAT-ano do devas esti samtempe ankaŭ LEA-ano.
11. En pli grandaj lokoj apartenu al la gvidantaro de la SAT-rondo prefere estrarano de la LEA-grupo, kiel interliganto de ambaŭ organoj.
12. La SAT-kotizoj estas tute sendependaj de la LEA-kotizoj; do decidi pri pagado kaj alteco de la SAT-kotizo estas nura afero de la SAT-rondo resp. de la SAT-organizo.
13. Sama kiel en projekto de EK de SAT.

---

7. La LEA por la franclingvaj regionoj (FEO) pridiskutis la demandon en sia kongreso en Bourges kaj starigis projekton, kiu preskaŭ tute similas tiun de GLEA. Por ŝpari lokon, ni publikigas nur la partojn, kiuj diferencas:

"La dua paragrafo tekstas same kiel ĉe projekto de EK de SAT.

10. La SAT-rondo ne havu specialajn kotizojn, sed ĉiuj aferoj estu ordigataj en kadro de la LEA-grupo. En ĝi ekzistu du specoj da aktivaj membroj: a) nacioj, b) sennaciecaj. Estas dezirinde, ke ĉiu SAT-ano estu samtempe LEA-ano. Ĉar SAT estas kultura superpartia organizo, la LEA-oj devas nepre progagandi en ĉiuj siaj eldonaĵoj por ke ankaŭ la LEA-anoj fariĝu SAT-anoj."

La SAT-anaro havas nun je sia dispono la diskutmaterialon. La decido farota en Göteborg povos do okazi en plena lumo. Oni jam povas aserti, ke ĉio iros glate kaj por ĉiuj kontentige.

**Ekzekutiva Komitato de SAT.**

---

## AVERTO!

La P a r i z a L a b. E s p. G r u p o ne plu respondecas pri la Klubo, 40, Rue des Petits-Champs. Ĝia iniciatinto, K-do Ferrari, eksiĝis el la Lab. Grupo, ĉar li ne akceptas la klasbatalan ideon, kaj aliĝis la neŭtralan grupon, de kiu nun dependas la citita Klubo. — N i a K l u b o f u n k c i a s en la Kooperativa kafejo: 44, rue Claude-Vellefaux, P a r i s X.

## GRAVA SUKCESO

Post elpaŝo de unu ĉefestrarano kontraŭ esperanto kaj deca respondo de la proponinto (K-do 7076), la 6. Kongreso de Polia Liberpensula Asocio (Lodz, 8.—9. aprilo 1928) per impona plimulto akceptis jenan rezolucion:

"La kongreso substrekas la gravecon de l' priesperanta rezolucio, akceptita dum la 5. Kongreso de PLA kaj konstatas kun kontento, ke la agado de l' lodza rondo de PLA direkte al ĝia efektivigo donis montrindajn rezultojn kaj ebligis akiri interligon de la lodza liberpensularo kun la liberpensularo eksterlanda, fidele al la devizo: Proletoj el ĉiuj landoj unuiĝu! Por envivigi ĉi tiun rezolucion kaj disvolvi internacian korespondadon per ĉiuj rondoj, la kongreso alvokas la estrarojn de ĉi-lastaj, fondadi — laŭ modelo de l' lodza rondo — kursojn kaj sekciojn esperantajn, kaj ĉiujn aktivajn liberpensulojn, ellerni la facilan lingvon internacian esperanto kaj kontaktiĝi helpe de konstanta korespondado en ĉi tiu lingvo kun la liberpensa Proletaro eksterlanda. La kongreso opinias, ke la liberpensa gazetaro devas agi direkte al la plenumo de tiu ĉi rezolucio." —

Raportis I u e l m u l t i u j.

## Alia vidpunkto

Ni ricevis jenan leteron: En n-o 179 de "S-ulo" aperis sciigo, ke la Lodza Filio de Polia Esp. Societo "Laboro" forigas SAT-anojn, ne permesas paroli pri SAT k eĉ malpermesas legi "S-ulo"n. Ni petas publikigi, ke tio estas malvera, ke nia societo forigas SAT-anojn, ne permesas paroli pri SAT aŭ eĉ malpermesas legi "S-ulo"n. Vero estas, ke nia societo sin tenas absolute neŭtrala al ĉiuj k ĉiaj esp. organizoj, do ankaŭ al SAT; ke inter la membroj de nia Asocio troviĝis ankaŭ SAT-anoj (kelkaj eĉ estraranoj de nia societo), kiuj, verdire, siatempe eksiĝis el SAT, sed pro privataj motivoj; ke ni abonis "SR" k "S-ulo"n, k la SAT-eldonoj troviĝas sur la unua loko de nia societa legejo k biblioteko; ke ni ne miksas nin k ne rajtas miksi nin en la intimajn interparolojn de niaj membroj, sekve ni ankaŭ ne povas malpermesi temojn pri SAT. Estu ankaŭ ĉi tie malkaŝite, ke kontraŭe SAT-anoj (membroj de esp. rondo ĉe la Liberpensula Societo en Lodz), konstante provokadas k ĉikanas nin, agitante ĉe niaj membroj, ke ili eksiĝu ktp. Eĉ la oficiala reprezentanto de tiu rondo, kiun ni invitis al malfermo de nia ekspozicio je la 17. 3. 28, publike k arogante dum tiu solena vespero ĉikanis nin, nomante nin mallojaluloj ktp. Ne dezirante senkulpigi nin, ni deziras sole konstati la s e n r e s p o n d e c o n de kelkaj SAT-anoj en Lodz.

Esperantista Societo "Laboro", Lodza Filio, Sekretario (subskribo nelegebla).

## Somera tendaro

Ĝis nun nur unu K-do interesiĝis pri la propono pri dumsomera tendaro en Britio (v. n-o 176, pĝ. 160). Se estas aliaj interesuloj, skribu plej baldaŭ al C. H. Brown, Siesta, Halliford Rd. Sunbury-on-Thames, Mdx. Aliel la proponinto forlasos la aferon.

## TRA LA MOVADO
(Kroniko)

**Aŭstrio.** V i e n o. La Viena SAT-rondo okazigis 25. 2. sian unuan "kulturvesperon" kun esperantlingvaj k germanl. prezentaĵoj, deklamoj, kantoj, teatroludo k alparoloj. Ĉeestis ĉ. 300 K-doj (ne nur esp-istoj). Multaj salutleteroj el eksterlando estis ricevataj. La sukceso de l' aranĝo montriĝas en novaliĝoj kaj nova fervoro de la jamaj SAT-anoj. Herzy (8863). — **Sovetio.** N o v o s i b i r s k. 30. 3. oni disvastigis per radiostacio trad. de "Impresoj pri Sovetio", aperintaj en "S-ulo". A. S. Petrov.

# La Lingva Angulo

**Demandoj:**

1. Kiu diferenco ekzistas precize inter la vortoj g v i d i kaj k o n d u k i. En neniu vortaro mi trovis bone diferencigajn ekzemplojn. (715.)

2. Ĉu estas korekta jena frazo: "Kaj jen estis la unua fojo, **ke** ili parole atentigis unu la alian pri la vidataĵo"?

3. Kio estas p e d o l o g i o kaj f e n o l o g i o? (90.)

4. Ĉu estas la sama senco en la frazoj: Mi vokas la knabon, kiu devas dormi (Ich rufe den Knaben, der schlafen soll. — I call the boy who is ought to sleep) kaj: Mi vokas la knabon dormontan (Ich rufe den Knaben, der schlafend sein wird. — I call the boy who will be sleeping). (4666.)

**Respondoj:**

1. K o n d u k i signifas agon kvazaŭ ĝenerale mekanikan. Ekzemploj: Mi kondukas aŭtomobilon. Mi kondukas blindulon. Mi kondukas infanon al la ĝardeno (t. e. mi prenas ĝin ĉemane kaj direktas ĝiajn paŝojn). G v i d i signifas agon, kiu postulas scion kaj sperton. Ekzemploj: Mi gvidas esperantan kurson. Mi gvidas laboristan organizon. Inĝeniero gvidas laboron de metiistoj.

2. Tiu frazo estas malkorekta. Diru: "(Tio) estis la unua fojo, k i a m ili atentigis . . ." aŭ, pli bone: "Unuafoje ili parole atentigis ktp."

3. P e d o l o g i o estas la scio (aŭ scienco) pri la infano, pri ĝiaj biologiaj funkcioj ktp. (Ne ŝ a n ĝ u kun p e d a g o g i o, t. e. edukado de infano.) F e n o l o g i o estas branĉo de la meteorologio, kiu studas la variojn, kiujn suferigas la diversaj klimatoj al la florado kaj foliiĝado de l' vegetaĵoj.

4. Ambaŭ frazoj estas nekompreneblaj, sekve malkorektaj. "Mi vokas la knabon, kiu devas dormi" ne havas laŭracian sencon, ĉar en esp-o ĝi ne povas havi la saman signifon kiel en la germana k angla tekstoj cititaj, sed nur povas signifi en esp-o: "kiu estas devigita dormi". La germanan esprimon vi devus traduki per: "mi vokas la knabon, kiu kredeble dormas". La dua frazo devus teksti: "Mi vokos la knabon, kiam li dormos". Oni absolute ne povas voki en la estanta momento iun el estonta dormo. (Tio estas germanismo!) I n t e r i m o.

## MEMORNOTO

**Represis el "S-ulo":**

L a R é v o l u t i o n P r o l é t a r i e n n e, Paris, 15. 4., Oni petas volontulojn (Eŭtrapel devas pagi premion!).

**Represis el "Senn. Revuo":**

U j E l ö r e, Nov Jorko, 20. 3. La defendo de la Komuno (marto 1924).

**Priesper. notojn k artikolojn enhavis:**

L e P o p u l a i r e, Paris, 13. 4.; C h e m n i t z e r T a g e b l. u. A n z e i g e r, 4. 4.; D a i l y H e r a l d, London, 13. 4.

**Pri SAT-kongreso enpresis:**

N e w L e a d e r, London, 30. 3.; T h e S h o p A s s i s t a n t, London, 14. 4.; B u l t e n o d e N a t. A s s o c. o f P l a s t e r e r s, G r a n o l i t h i c a n d C e m e n t W o r k e r s, London, marto.

## NIA POŜTO

**6477, 8497.** — Por vi mi kopias jenan difinon de Kabe pri la vorto **ironio.** "M o k a p a r o l m a n i e r o, k i e s e s p r i m o j h a v a s k o n t r a ŭ a n s e n c o n a l t i o, k i o n o n i v o l a s d i r i." Bone pripensinte tiun difinon, bonvolu relegi la de vi priparolitan artikolon, k eble vi ne plu fuŝkomprenos ĝian sencon. — E. L.

**Iuelmultiuj.** — Ĉiuj viaj artikoloj, ankaŭ tiu pri Laborinspekt., aperos laŭvice (tiu pri religio tamen nur en okazo de bezono).

**4160.** — La art. pri asekuro jam troviĝas en la presejo. La duan ni nur en okazo de bezono povos utiligi pro manko de loko.

R e d.

**11 193.** — Via majanonco alvenis tro malfrue. Ni kreditas al vi tiun sumon. A d m.

### TUTMONDA FERVOJISTARO!

En niaj vagon-laborejoj, kie laboras 1800 laboristoj, fondiĝis du esp.-rondetoj kun pli ol 80 gelernantoj. Propagand- k perfektiĝ-cele ni serĉas gekorespondantojn inter la fervojistaro k aliprofesiularo en ĉ. l. p. ĉ. temoj. Ni interŝanĝos ankaŭ gazetojn, ĵurnalojn, murgazetojn, raportojn ktp. Kontraŭ la "Fervojisto" ni sendos nian ruslingvan "La Fervojisto". Atentu kaj pruvu al niaj skeptikuloj la gravecon de esp-o por intern. solidareco. Resp. garantiata. Peranto: Ŝ. G o l d f e d e r, SAT-ano 5448. Adr.: B a r n a u l (Sovetio) Mestkomglavniĥ vagoniĥ mastjerskiĥ dla esperantistov.

### K-DOJ STENOGRAFISTOJ!

La Germ. Lab. Stenogr. Asocio petas jenon: Bonvolu sendi materialon por stenografa ekspozicio internacia (pri ĉiuj sistemoj); broŝurojn, flugfoliojn, lernolibrojn ktp. Rekompence vi ricevos PK-saluton. A d r e s o : **Esperanto-Informejo, Schweidnitz (Germ.).**

### Atentu gekamaradoj ĉiulandaj!

Lab. Esp. Klubo en Bos. Brod (Jugoslavio) aranĝos en junio sian unuan esp. ekspozicion, por propagandi esp-on inter gelaboristoj. Ĉiuj gek-doj k administrejoj de esp. gazetoj estas petataj sendi esp-aĵojn. Ĉiu ricevos rekompence PI de nia urbo. Helpu nin en nia laboro! Sendu multnombre! Adr.: K-do **Franjo Homar, Bos. Brod,** Jugosl.

**ĈELO JUNKOMUNISTA** ĉe elektrostacio dez. interŝ. L, PK, PI, ĵurnalojn, gazetojn, fotojn ktp. kĉl. konstante kaj speciale al l. majo. Resp. garantiata. Adr.: K-do **Korjakovcev, Krasnouîimsk,** Uralo, Elektrostancija (Sovetio).

### ATENTU, PRAGANOJ!

Mi serĉas seriozajn gek-dojn el Prago, kiuj partoprenas la internacian esperanto-tagon en Neudeck dum pentekosto. Post la Neudecka okazo mi volas viziti Pragon. — **Fr. Kramer, Lunzenau/Mulde,** Altenburger Str. 93.

## ENHAVO:


| | paĝo |
|---|---|
| La kreskado de la laborista movado en Japanio | 247—48 |
| La hodiaŭa Usono | 248 |
| Letero el Estonio | 248—49 |
| Purcel pri la hindaj laboristoj | 249 |
| Blanka teroro en sendependa Polio | 249 |
| Pri malsanula asekuro en Germanio | 249—50 |
| Trimil tricent sepdek naŭ tagoj el mia vivo | 250—51 |
| Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo | 250—51 |
| Tra Esperantio | 252—54 |
| Anoncoj | 254 |


Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)